Nov '37
Vol 52
No 1

AMERICAN ESPERANTIST
Vol. 52
AMERIKA ESPERANTISTO

LA MONATA BULTENO DE LA ESPERANTA-ASOCIO DE NORDA AMERIKO
Joseph Leahy,General Secretary
Centra Oficejo 1517 H Street,N.W.Washington,D.C. Central Office
J.R.Scherer,Pres.Los Angeles,Calif.--E.G.Dodge,Ch.Exec.Comm.Wash.D.C.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

Number One * * * $1.00 per year-anywhere * * Ten Cents copy* * November*1937

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

B O N V E N O N   A L   L I D I A   Z A M E N H O F !

Dank'al la iniciativo de la Bahai de Usono,la estiminda filino de la kreinto de Esperanto venis al Usono. La speciala Lidia Zamenhof Komitato de EANA jam bone funkcias kaj zorgas pri plej bona uzo de la grandaj talentoj de la eminenta samideanino, ĉefe por propagandi kaj instrui Esperanton. Ŝia vizito estas historia okazantaĵo por ni. Do, tutkoran Bonvenon al Usono. S-ro Eby,estro de la speciala komitato, raportas pri bona progreso de ŝiaj unuaj klasoj en Nov Jorko. Valorus la penon kaj la monon por ĉiu usona Esperantisto vojaĝi al Nov Jorko,por persone vidi kaj aŭdi la personon kaj la instruadon de la mondfama instruistino,kiu uzas la Cseh-Metodon konata en preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo. Sed ne estas necese vojaĝi al Nov Jorko ! Ĉiu urbo kiu havas eĉ nur kelkajn Esperantistojn,povas inviti la filinon de la majstro por instrui Esperanton al komencantoj kaj progresintoj,kontraŭ kurskotizoj multe,tre multe malpli altaj ol kostus la vojaĝo de unu samideano al Nov Jorko. Sed rapideco estas necesa ! Ĉiuj urboj,kiuj ankoraŭ ne skribis al s-ro Eby (320 East 42nd St., New York.) devas tion fari tuj,se ili volas esti certaj ke Lidia Zamenhof venu al iliaj urboj. Tiel vi ebligas al s-ro Eby aranĝi por la estimata gasto vojaĝon ne tro zigzagan de urbo al urbo. Do nepre rapide skribu al la komitato.

Joseph R. Scherer.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

ĜISNUNA LISTO DE PATRONOJ

1. F-ino A.J.Kruka
2. Prof.Frank Tomich
3. D-ro Cecil Stockard
4. S-ro E.G.Dodge
5. D-ro A.M.Schwager
6. Prof.A.I.Rogus
7. Prof.H.W.Hetzel
8. S-ro Fred H.McMann
9. S-ro S.M.Quraishi
10. F-ino Virgie Vail
11. S-ro W.B.Patzer
12. (Estas Vi ?)
13. F-ino Julia May Leach
14. Anonima amiko)
15. (Estas vi ?)
16. (" " ")
17. S-ro Oscar Muenzer

Kiu ajn plua membro deziras fariĝi Patrono de EANA., bonvolu sin anonci al la sekretario. Ju pli multaj la subtenantoj, des pli bona kaj vastskala povos esti la laboro de EANA por "NIA AFERO"-ĉu ne ?

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

* *

ĈIAM PORTU LA VERDAN STELON, VI ATENTIGOS LA PUBLIKON PRI ESPERANTO KAJ LA SAMIDEANOJN PRI VI MEM. La Signo de Internacia Komprenigo de Popolliganta ideo. La Magia Ŝlosilo al Homaj Koroj-Esperanto-Emblemo en Butontruo. Ĉiu Bona Esperantisto FIERE ĜIN PORTUS. Verda Stelo kun ora "E", kaj ora protekto sur stelpunktoj. Elekto: Ŝraŭbo 40¢; Sava Pinglo 50¢. Ĉe EANA Oficejo.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

ESPERANTO CLASSES reported recently. Minneapolis-Miss Elsa H. Steinmetz. New York-Sro Louis Dormont (in Harmonia Club). Urbana, Ill. Sro E K Rees-he also brings in the public with stereopticon pictures depicting scenes more or less connected with the Esperanto movement.

Washington, D.C. Intermediate and Advanced, led by Mr E G Dodge in Thomson School, Tuesday evenings. Beginners, led by Mrs Maude Sawyer Taylor, in the 17th St., YWCA., Friday evenings. Boston, Cseh method classes, Miss Roan U. Orloff teacher.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

RESPONDE AL MIAJ VORTOJ en la Septembra numero "Ĉu ni estas pretaj?" S-ro Dubin, la estro de la Komitato pri Leĝfarado, asertas ke "ni estas pretaj", ke ni ne bezonas timi la publikan opinion, ke la publiko generale akceptas kiel studfakojn tion, kion la leĝo diras, se la fako ne estas deviga. Do, mi denove petas, ke ĉiuj lernejaj fakuloj kunlaboru inter si, kun aliaj, kaj kun EANA por helpi efektivigi la kreon de leĝoj en Usono por instruado de Esperanto. Sendube s-ro Dubin jam havas kompletan planon, kaj statistikojn, kiel plej efike ataki la kolosan taskon. Kaj ĉiu, kiu povas helpi kompetente, nepre skribu al li, promesante sian helpon.-- Sed, mi tamen, ankoraŭ kredas ke estas necese kaj utile (eĉ por la leĝfarado) daŭrigi la generalan propagandon por eduki la generalan publikan opinion. Do, mi ripetas, ni ĉiam kaj ĉie digne kaj inteligente (ne nur diligente) devas varbi kaj propagandi....ne nur kelkaj, sed ĉiuj!

Joseph R. Scherer

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

"SHE IS THE MOST FASCINATING PERSON I HAVE EVER SEEN" said a very prominent lady after witnessing a lesson in the Cseh Method, given by Miss Lidia Zamenhof, in New York--the lady was so impressed that she at once paid for course of lessons for a neighbor. Many who have met Miss Zamenhof are of the same opinion as above mentioned "She is wonderful" "Dynamic" are some of the expressions heard. "You may never have heard of Esperanto, but if you attend a demonstration by Miss Zamenhof, I have no doubt in the world but that you will be an enthusiast for the International Auxiliary Language". Local Committees get busy, interest as many as possible--and get a definite-or as nearly so as possible--idea of how many will take courses.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF CLEVELAND held a banquet Friday, Oct. 15th, under the auspices of the Loka Kongresa Komitato for the 1938 congress. The Program which followed was the first act of the coming congress, and the official opening of public preparations. A representative of the "Come to Cleveland Committee" of the Chamber of Commerce spoke. The fullest co-operation of this organization with all its facilities was promised. Miss Ellen Anna Fenner told how, through Esperanto, she was able to bring together a separated family-partly in Budapest and partly in Usono, for many years out of communication. Lidia Zamenhof, her stay in America and future visit to Cleveland was discussed. A radio theatrical: "World Progress Marches On" ended the jubilant program. The meeting was largely attended. (GET READY FOR CLEVELAND).

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

* *
(Copy of article in the JOURNAL of COMMERCE and COMMERCIAL,N.Y. Oct.5.'37)

"FRANCE TAKES OFFICIAL NOTICE OF ESPERANTO."

"Paris (UP).-Esperanto,artificial international language which is supposed to be the easiest amalgam of all the world's languages,is rapidly becoming an important language in France. Already the Government-owned telegraphic system has admitted Esperanto as an official language usable in sending messages. Esperanto henceforth will figure alongside French and English in signs of all Paris railroad stations,designed to guide the wandering foreigner. The Paris Chamber of Commerce is offering courses in the international language and there are several score stenographers who can take dictation for those wishing to send letters in it. Esperanto has gained the air,Lille radio station regularly part of its program in this language. Dr.L.L.Zamenhof,who invented the artificial language,perhaps would be more pleased with a sign of literary recognition. A short time ago one of Jules Romain's best comedies "Mr. Knock" was presented at the Sorbonne in Esperanto. There has even been a case reported of a minister who delivered his sermon in Esperanto"

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

ESPERANTO WAS ADMITTED TO the list of "CLEAR LANGUAGES" by the International Telegraphers,at their Convention in Paris 1926.Many radio stations have regular broadcasts-Tallinn Estonia station has had regular weekly broadcasts for the past 9 years.The FIRST Esperanto Broadcast was from New York,June 19 1922,First European broadcast (Esperanto) was from London,December 8,1922. Many clergymen have held services and delivered sermons in Esperanto.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

LA JARKUNVENO DE LA KANADA ESPERANTISTA ASOCIO okazis en Hamilton,Ontario,la 25an de Septembro. Laŭkutime la membraro elektis la konsilantaron,kaj la konsilantaro nomigis el si mem la oficistojn. S-ro Norman Todd,de Hamilton, estas ree la Prezidanto.

Oni ricevis novaĵojn de la grupoj. La Toronto grupo metis Esperantaĵn libroĵn en la publika biblioteko,kaj disvastis informoĵn perradio. En Hamilton, la grupo provizas instruiston por klaso en Esperanto,direktota de la Laborista Eduka Asocio. Per ĉina membro, nuntempe vizitante en Toronto,oni lernis pri agemeco en Vancouver.

Ĉe la vesperkunveno,oni laŭtlegis el la nova libro "Arĝenta Duopo" pri la jubileantoj Baghy kaj Kalocsay,kaj surprize trovigis en la grupo la "lingva avo"de la Duopo. S-ro J J Sussmuth,kiu nuntempe estas prezidanto de la Toronta grupo,kaj Vicprezidanto de la K E A,vivis en Budapest kelktempe antaŭ tridek jaroj,kaj tie li instruis Samideanon August de Marish,kiu laŭvice instruis Baghy kaj Kolacsay. Kiel malgranda estas Esperantujo!

Oni raportis pri Gazeto de Esperanto kaj la fondiĝo de Tutamerika Esperantista Komitato,kaj la socio aprobis la elekton de Sro E J Bengough,Honora Prezidanto,kiel Kanada komitatano. Oni priparolis la Varsovian Kongreson,kaj espereble la asocio estos reprezentata en la venonta Londona Kongreso,1938.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

AUSTRIAN TIMETABLES have 2 1/2 pages of information in Esperanto,under the titles: "Legu antaŭ la uzado de la libro", "Ŝlosilo por la horarlibro","Komparo de la tempo",and "Klarigo de la signoj".

FOR THE BENEFIT OF FOREIGNERS,not knowing Czechoslovakian,the railroads have plaeed medallions on the walls of the railway stations,with the text in Esperanto.(Everybody will know Esperanto as soon as they wake up from their centuries' sleep-ĉu ne?)

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF THE ESPERANTO ASSOCIATION of N.AMER.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*XX*X*X*X*X*X

ESPERANTO, LA MAGIA TAPIŜO.

Miaj Spertoj pri Internacia Korespondado.

Premigajninta Artikolo, Verkita de
F-ino Olive Vincent Marsh,
Long Beach, California.

Malproksime, en mia infaneco, estis fabelo pri magia tapiŝo. Ĉiam mi revadis pri ĝi, kaj deziradis vojaĝi sur tiu ĉi hela kaj ĉarma ŝipo. Tial, kiam mi fariĝis maturaĝa kaj eltrovis ke magia tapiŝo efektive ekzistas en Esperanto-lando, mi ĝojis kaj ne perdis tempon, sed tuj vel-veturis.

Mia magia tapiŝo min portis al bela Czecho-Slovakio, kie per la okuloj de mia amikino mi vidis ŝian karegan landon. Mi lernas ĝian historion. Ĝiaj herooj fariĝas miaj konatoj. Mi vidas la belan urbon, Praha, kvazaŭ mi loĝus tie. Mi konas ĝiajn turojn. Mi marŝas laŭlonge de ĝiaj pontoj. Mi estas fiera pri la nuna libereco de la lando. Mi ĝojas, ke la popolo de Czecho-Slovakio estimegas unu el niaj usonaj Prezidantoj, kiel fondinton, kun ilia propra Prezidanto, de la Czecho-Slovaka Respubliko. Antaŭe, Czecho-Slovakio estis nur fremda lando. Nuntempe, Czecho-Slovakio estas ankaŭ mia lando, ĉar mia amikino donas al mi parton en sia ŝatata nacio.

Poste, Aŭstra knabeto fariĝis la piloto de mia ĉiel-ŝipo. Li gvidis min al Aŭstrujo, kaj invitis min al sia ĉarma dometo, kie mi loĝas samideane, kun li kaj liaj patrino kaj fratino. Mi vidas ilian Kristnaskan Arbon kun ĝiaj helaj kandeloj. Mi havas geamikojn en Aŭstrujo, kaj Aŭstrujo fariĝas la mia.

En Litovujo estas du knabinetoj kiuj sendas al mi poŝtkartojn kaj mapojn pri sia patrujo. Mi tien direktas mian magian tapiŝon. Mi vel-veturas super la kampoj kaj urbetoj de tiu lando. Mi vidas ĝiajn sovaĝajn anserojn flugantaj super la kamparo. Mi vidas la altajn lignajn krucojn laŭlonge de la vojoj. Mi sentas la longan, malĝojan historion de tiu ĉi lando. Ĝiaj penegoj iĝas parto de mia propra vivo, ĉar miaj amikinetoj loĝas tie.

Tiam, mia magia tapiŝo portas min al Finnlando. Mi flugas super ĝi, kaj rigardas malsupren, kie mi vidas la milojn da ĝiaj lagoj. Mi vidas mian amikon tie, kiu estas terkulturisto. Kune kun li, mi vidas la printempon venanta al lia bieno, proksime de lago. Mi vidas la birdojn konstruantaj siajn nestojn en liaj altkreskaj arboj. Li sendas al mi ilustritajn gazetojn kaj belajn bildojn, kaj li desegnas skizojn en siaj leteroj. Li donas al mi parton en sia lando, en sia vivo. Mi sentas ke mi ankaŭ apartenas al tiu ĉi lando, ĉar mi povas ekkoni ĝin per la okuloj kaj per la koro de mia amiko.

Sed estas Svedujo kiun mi konas la plej bone el ĉiuj. Mia sveda amikino korespondadis kun mi dum kelkaj jaroj, tiel ke ŝia lando ŝajnas al mi bone konata. Tie mia magia tapiŝo faras multajn feliĉajn alteriĝojn. Mi vidas belegan Stokholmon. Mi konas la maljunan urbon "inter la pontoj." Mi supreniras al la altaĵoj de Söder. Mi veturas tra la bela Insularo. Al mi estas konataj la ĝojeco kaj la amikeco de la svedoj. Mi eĉ vojaĝas al Laplando kun mia amikino per la multaj leteroj, broŝuroj kaj fotografaĵoj kiujn ŝi sendas al mi. Ŝia belega urbo estas ankaŭ mia urbo. Mi ankaŭ estas fiera havi parton en la "Lando de l' Meznokta Suno."

Tiel, do, mi vojaĝas malproksimen sur mia magia tapiŝo. Ĉiam mi trovas geamikojn. Ĉiam mi vizitas interesegajn landojn, antaŭe nekonatajn sed en kiuj mi nun povas havi parton. Mi sentas, ke neniu estas fremda al mi, ĉar la magia tapiŝo ilin alportas al mi kiel gefratojn. Mi sentas, ankaŭ, ke iliaj landoj estas ankaŭ miaj landoj, ĉar nenia lando estas fremda kiu estas la hejmo de miaj geamikoj.

* *

E A N A-Rondo de Librolegantoj. Entusiastic responses have been coming in. But their numbers have not yet swelled to the proportions of an inundation! In fact, ten days ago when our copy was ready for the printer, only about twenty had yet availed themselves of the chance to become "charter members" of this delightful auxiliary to our organization. It will be indeed helpful to our movement, as well as a personal satisfaction to the enrollees, if several times twenty shall have listed themselves before our December number goes to press. In the Christmas issue we plan to give honorable publicity to all members of the book-readers' circle by publishing the full list up to that date(Nov.20).--If any should prefer to remain anonymous, his expressed wish would be respected. Already five members are enrolled in the Five Star grade--the highest thus far recognized. But it has been decided to widen the scope of the registration and to award a Six Star grade to any member who has read more than 7,500 pages of Esperanto literature, and a final Seven Star grade for 10,000 pages-Don't crowd.

At the same time, our hearts are as much interested in receiving many enrollees in the lower grades-with the two stars, or only one. If you have read a book or booklet of Esperanto literature(originals or translations) amounting to 100 pages or upward, just send a list of your readings--with 6¢ in stamps--to Kenneth F.Rogers, 138 Benj.Franklin Station, Washington, D.C.

X*X*X*

NI FUNEBRAS.

Mortis la 7-an oktobro, Samideano Henry Wright Fisher, unu el la eksprezidantoj de Esperanta Asocio de Nord-Ameriko kaj dum longa vivo fervora subtenanto de la Esperanta movado. S-ro Fisher naskiĝis 1861 en Irlando, migris kun la patra familio al Argentino, kaj en 1874 li venis al Usono. En 1888 li fariĝis diplomito de la universitato Cornell, kaj poste li ĝuis sukcesan karieron sur la agadkampo de prielektra inĝenierado. Dum kelkaj pasintaj jaroj lia sano estis nebona, kaj li do loĝadis en Florida aŭ alie en sudaj ŝtatoj. Li eliris la vivon en Asheville, N.C., en la sanitorio; kaj la enterigo estis en Malvern, Pennsylvania, ĉe la pregejo de la Societo de Amikoj (Kvakeroj.) La usona Esperantistaro perdis tre valoran membron. Ni esprimas koran simpation al la parencaro.

JUBILEA KANTO

Duonocentjaron antaŭe presiĝis
Popolkomprenilo konata de ni
Laŭ lando kaj gento ĉi reliberiĝis,
Amata Doktoro, ni kantas al ci.

Ni ankaŭ prikantas la lingvon mirindan
Dum jaroj kreskantan pli forta. Ju pli
Ni studas ĉi tiun sonaron amindan,
Des pli, Esperanto, ni kantas al ci.

Ho, lando en kiu malfremda amiko
Fariĝas ja julandano, ĉar li
Renaske aliĝas al ci, Ameriko.
Patrujo amata, ni kantas al ci.

Prikantu ni nun la espersocieton
En kiu honoras ni ĉi tiujn tri:
La landon, la lingvon, la saĝan profeton.
Antaŭen, E A N A, ni kantas al ci.

Nun laŭre ni kronu eternan mondpacon,
La celo de ia ajn grupo ĉar ĝi
Alportus homaren karegan donacon.
Espero homara, ni kantas al ci.

Donaco sen la Donacanto vaniĝas
Kaj vane konstruas la homo sen Li.
Purigu kaj ĉies korkoro puriĝas!
Nin benu, ho Dio, ni kantas al Ci.

D-ro Elliot Q. Adams, Cleveland, Ohio.

MEMBERSHIP RATES.

M---EANA & IEL, with "American Esperantist" for one year. $1.50
MJ--EANA, IEL, "American Esperantist" and Jarlibro (Yearbook). . . . . $$2.50
MA--EANA, IEL, "American Esperantist", Jarlibro and "Esperanto Internacia. $4.00
MAH-EANA, IEL, "American Esperantist", Jarlibro and "Heroldo de Esperanto. $6.50
MS--EANA, IEL, "American Esperantist", Jarlibro-may receive both the Weekly and Monthly publications, or may elect to receive instead of the "Heroldo de Esperanto", a selection of book premiums from an already published list-ask for it. $8.50

(Esperanto Internacia is the Weekly, and "Heroldo de Esperanto" Monthly.)

The Yearbook is a directory of Esperanto Delegates in all parts of the World, Publications, Organizations, and all manner of information necessary to anyone wishing to be 'posted' on Esperanto affairs-worth many times more than cost of membership. EVERY ESPERANTIST SHOULD BE A MEMBER OF THE E.A.N.A.

ESPERANTO PENNANTS

Like the one pictured here- useful for the auto, clubroom, den.
Green star and word on a white field.
18 x 36 inches - washable cotton felt.
Send 55 cents to J.W.Dubin- 646 Westview St.-Phila.

* *

"THE T E X A S E S P E R A N T I S T ."

"Progress is the order of the age" seems to be the slogan of the publishers. From one page a short time ago to Four Pages in the last issue-and every line "says something". Rev.John H.Fazel,chief editor,just returned from a several weeks visit to Topeka,deals out a lot of good advice and suggestions (as usual)-even uses "La Sago kaj la Kanto" to prove that persistent effort brings reward.. Mrs Charlotte Fosselman-a Texas born resident of Washington, D.C.,now visiting in Germany had a very interesting letter in the "T E" about her experience at the Universal Congress in Warsaw. F-ino Philippa Stoneham-Vice-Pres. E A T--likens the indecision of Caesar at the Rubicon and the Esperantists indecision to meet the indifference or joking of the cynics,and advises them to emulate Caesar-He crossed. (ANTAŬEN! CERTE!) The "T E"gave considerably more space to the fire loss of our good sister-Ann Beatty-than our limits would permit.Bonega. The Houston FERVORULOJ-and they are,really-we've been noticing their strides for years--Clara Louize Saner, J.Frank Summers, Billy Lockhart and C M Sanders have taken up the 'Dare'of the "T E" editor and contributed a whole page of very interesting material-and promise to even improve on that.(BONEGA)).

*X*X* X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

SE VI KONUS IUN,kiu,kvankam korpe nepovanta ĉeestadi lernejon; ankoraŭ estas tamen,bone elfarinta edukadon per sola mem-instruado; placu komuniki kun David D.Bartholomew,819 So. Third Ave., Bozeman, Montana.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

* *

KURAĜIGU LA ELDONADON en Brazilo, mendante rekte al Livraria Editora da F.E.Brasileira,-Av. Passos,30,Rio de Janeiro,LA UNUAN LIBRON ORIGINALE VERKITAN EN ESPERANTO KAJ PRESITAN EN BRAZILO:"Veterano?",de Ismael Gomez Braga,prezo afrankita broŝ.,1.50 sv.fr.,aŭ 0.40 usona dolaro; tole bind.2.50 sv.fr.aŭ 0.60 usona dolaro.(aŭ egalvaloro).

* *

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

ESPERANTO-RONDO AMERIKA is the latest announced society-just formed in Boston. Officers: Pres., Roy B.Anderson, Vice-Pres., Eric Thomas, Sec'y Miss Watson, Treas., Mrs Oglesby, Librarian, Mrs McAlear, Class Instructress Miss Roan U.Orloff (Cseh Metodo). The manager of the Hotel Gralyn 20 Charlesgate West,Boston,has given the new society a room for meetings and it is called "ESPERANTO ĈAMBRO".The officers are confident that the membership will be 100% E.A.N.A. L'ESPERO, L'OBSTINO,kaj la PACIENCO.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

A LITTLE EARLY,but how about that Christmas Card? Samples 5¢. Dozen 50¢

X*X*X*X**XX*X*X*X*X*XX*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

La Naiveco de Pastro Brown-by G K Chesterton,translated by Dr Cecil Bean. 256 pages,price 90¢.,Esperanto Publishing Co.,Heronsgate,Rickmansworth,England. Notwithstanding the many words that sends the reader(unsuccessfully) to the dictionary,he will find excitement,murders,executions galore-and Pastro Brown's reactions are not exactly those of the average detective mind-but they amply justify the title of the book.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

ZAMENHOF WEEK, DECEMBER 12 to 18, BIRTHDAY 15th-CELEBRATE-BUY A BOOK ETC.,

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*

MANY PEOPLE ASK US TO INSERT THEIR little advts.,free(kompreneble).Lack of space-and finance-prohibits the extra pages.Note rates on last page-EASY.

X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X

* *

TEXTBOOKS.

Practical Grammar,Dr.Ivy Kellerman-Reed,member of World Language Comm.....75¢
Step by Step in Esperanto,M.C.Butler,splendid for self or class study.....60¢
Grammar and Commentary,General Cox. Filled with examples helpful to all.$1.00
Practical Course in Esperanto-Dr.Szilagyi.Has many amusing pictures to help.
(adapted for English speaking folks by Fred Wadham-(One of the best).......50¢
Esperanto Course- Simon and Volper.Its different but a good starter........10¢
Beginners' Easy Course-Karl Froding. The adjective tells the story.........10¢
Esperanto Home Student.Latest edition-July 1937.Peerless for self or class study.More than 50.000 in use.The author,Jas.Robbie is one of the BEST.....20¢
MILLIDGE ESPERANTO-ENGLISH Dictionary.Has no equal.Thousands of examples.2.75
FULCHER & LONG ENGLISH-ESPERANTO " .Fit companion for MILLIDGE..........2.40
EDINBURGH.The TWO WAY-English*Esperanto and Esperanto*English.Pocket size
This book is really indispensible to new or old Esperantists-THE EVENTUAL 1.00
English-Esperanto Key.Vest pocket size-so that you can name things seen.....05

....

EASY AND INTERESTING READING

Sub la Meznokto Suno(Dr L.Wendell) 25¢Legolibro.Outlines of popular stories.25
Sep Ridoj. 7 laughable tales " 25¢Esperanto,its aims and claims.B.Long..20
Akrobato de Nia Sinjorino(Payson) 25¢Blanche,Virgulino de Lille(Payson)....20
Taso de Amservo (Taylor-Weems).....25¢Miserere kaj Thais....................25
La Karto Mistero-tre intriganta....25¢Rozujo Ciumiljara (Wagsnalls)........25
Kiel Plaĉas al Vi("As you Like It")by La Regno de l'Vero (A.M.Koliner)......20
Dr Ivy Kellerman-Reed.Lea.50¢Paper 35¢La Mopso de la Onklo,-doggone! 15
Rakonto kaj Aventuro,(Hall)........15¢Juneco Kaj Amo,Payson).Bds 25¢,paper..15
La Vojo Returne("The Way Back").$2.00 Per Balono al la Polusa (Andre)....$3.00
Versaĵetoj, 40 pages of verse......15¢Princ' Vanco,(Putnam k Bates)..........25
"ĈIRKAŬ la Mondo kun la Verda Stelo" Joesph R.Scherer.(Too Good to Miss..$1.75
Holy Bible,$1.75 to $3.25. New Testaments,25¢ to $1.75.

. . . .

LA KONGRESA LIBRO-ORA JUBILEO DE ESPERANTO-1937,is a souvenir that every Esperantist should have--and having it you will be very proud of it. It is a masterpiece of the printer's art, and the contents are worthy a place among the Classics. Many are presenting this book to their Clubs and City Libraries. Nothing would be more appreciated as a gift by the Esperantist friend. Burnished silver cover,green and gold lettering. The work of Mr A.M.Koliner, Detroit,Michigan(also maker of the 1936 Kongresa Libro, so much admired).....25¢

. . . .

SUSCRIPTIONS."British Esperantist"(Monthly) Established 1903. per year....75
"La Praktiko"(Monthly)All Esperanto.Instructive,and Amusing..." " .$1.50
"Esperanto Internacia"(monthly) all Esperanto.Official organ IEL " "..$1.50
"Heroldo de Esperanto"(Weekly) " " " " " " "..$3.85
"La Juna Vivo"(Monthly)all Esperanto.Good stories for young folks,also a good textbook,75¢.Whole year collection bound-of previous issues..........75
"Verda Revuo" (Monthly) All Esperanto.Instructive,Amusing,Interesting,Yr..60
Get our list of "Club"and Special rates on any periodical published-postal.
X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*
PHOTOGRAPHS of Dr Zamenhof 8X10 50¢.PC size 10¢.Stamp type 25¢ per dozen.
X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*
ADVERTISING rates.25 words(minimum) 25¢.1x3 1/2 inch,50¢-or 3 times for $1.
Full page $4.00. Send copy before the 20th. EANA,1517 H St.,Washington.
X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*X*